La deĵorperiodo de Re prezentantoj en Teksaso estas du jaroj, same kiel en la Teksasa Parlamento. Dum la unua jaro de la deĵorperiodo, ni kunvenas kun pli aĝaj teksasanoj kaj diskutas iliajn problemojn, ni esploras pri tiuj problemoj, kaj proponas kaj skribas la rezoluciojn. Rezolucio estas unu-paĝa priskribo de problemo kaj sugesto de ebla solvo de tiu problemo. Ĝi devas enteni kelkajn "Pro tio, ke" propozicioj kaj unu aŭ du "Ĝi estu decidita, ke" propozicioj. La rezolucioj iras tra kelkaj niveloj de aprobo ene de TSHL. Unue aferkomitato voĉdonas ĉu rezolucio estu akceptita. Tiam la tuta membraro de TSHL voĉdonas ĉu akcepti la rezoluciojn. Fine la akceptitaj rezolucioj estas rangigitaj. Aprobataj rezolucioj estas kompilitaj en parlamentan raporton. Tiu raporto estas disdonita al ĉiuj membroj de la Teksasa Subŝtata Parlamento.

Dum la dua jaro ni aparte aŭ en grupoj kunvenas kun niaj Subŝtataj Parlamentanoj kaj porparolas favore pri la rezolucioj. Parto de tio estas prezento de nia esploro pri la rezolucioj al la Subŝtata Parlamento. Ni prezentas ankaŭ al lokaj afergrupoj porparolante niajn rezoluciojn kaj la bezonojn de pliaĝaj teksasanoj.

Ĉiu Re prezentanto en TSHL reprezentas pliaĝulojn en regionoj de Teksaso. Ekzemple mi reprezentas la regionon Texoma. Ĉiu regiono havas konsilion de registaroj. Estas 28 tiaj konsilioj en Teksaso. Ĉiu konsilio de registaroj havas Regionan Agentejon pri

Pliaĝiĝo (angle: Area Agency on Aging). Tiuj agentejoj havas servojn kiuj estas haveblaj al individuaj pliaĝuloj en la regiono. Re prezentantoj en TSHL ofte interagis kun la Direktoro de la Regiona Agentejo pri Pliaĝiĝo.

TSHL restas efika tra ĝiaj komitatoj. Ĉiu Re prezentanto estas membro de du komitatoj: administra komitato kaj afera komitato. Ekzemple, mi estas ano de la Teknologia Administra Komitato kaj la Aferkomitato pri Emeritiĝo kaj Pliaĝiĝo. La Teknologia Komitato estas tre aktiva. Ni kunvenas per Zoom semajne. Ni konstruas novajn elementojn de la retejo kaj ni strebas senpaperigi la interagon de Re prezentantoj per la uzo de pleneblaj formularoj. Tiu komitato pritraktas ankaŭ la mikrofonojn kaj projekciilojn uzatajn dum kunvenoj. Mia aferkomitato Emeritiĝo kaj Pliaĝiĝo estas iom malpli agema. Ni aprobis naŭ rezoluciojn dum la pasinta deĵorperiodo.

Kiam oni unue fariĝas membro/re prezentanto, la Parolanto/prezidanto de TSHL demandas kiujn komitatojn oni deziras. Nature la Parolanto devas trovi ekvilibron en la komponado de la komitatoj. Estas anticipado ke ĉiu membro de TSHL estu aktivaj. En tiu ĉi maniero ĉiuj bezonoj de TSHL estas kovritaj.

La plej altrangaj rezolucioj de tiu ĉi 2021-2023 sesio estas:

1. Ŝtate provizitaj infanrilataj enspezoj, Sekvu la Infanon
2. Pliigu la monasignaĵon por personaj bezonoj de Medicaid-loĝantoj en maljunulejoj
3. Permesu la Emeritan Sistemon por Instruistoj provizi pliiĝojn al ties emeritoj pro la kosto de vivado.
4. Permesu 13-an monatan pensian renton (pagon) por la Emerita Sistemo por Ŝtataj Dungitoj.
5. Plibonigu la legeblecon de la Peto kaj Dokumentoj por Baloti per Poŝto por malpliigi

la kvanton de malakceptitaj balotoj.

Dum la 2023-a kunveno de la Teksasa Parlamento 16 el la 54 rezolucioj kiuj TSHL submetis la Teksasa Parlamento almenaŭ parte fariĝis leĝo en Teksaso. Dum la vivo de TSHL ekde 1985, pli ol 900 aferoj estas prezentitaj al la Teksasa Parlamento kiel rezolucioj. 275 el ili aŭ plene aŭ almenaŭ parte fariĝis leĝoj.



**Fred MEYER, III**

Fred estas emerita teoria fizikisto kiu laboris ĉefe en la duonkonduktaĵa industrio. Li eklernis Esperanton en 1966 kaj uzas ĝin de tiam. Li ĝuas verki en Esperanto kaj traduki Esperanten. Amikeco inter homoj kaj la disvolviĝo de ties lingvoj kaj kulturoj ankaŭ tre interesas lin.

<f3meyer@gmail.com>

## ***atendi, ĉeesti, partopreni, viziti, prizorgi, and atenti***

language corner • Lee MILLER

**Atendi** is a “false friend” for English speakers learning Esperanto. It means “to wait for,” “to await,” “to expect.” For example:

Mi **atendas** gravan leteron.

**Atendu** min ĉe la restoracio.

Mi **atendas**, ke pluraj homoj venos al la kunsido.

Fidela hundo **atendas** sian mastron fine de la tago.

It doesn't mean “to attend” in the sense of “to be present at,” “to participate in,” etc. Esperanto has a range of other verbs for these meanings. Here are several with examples:

- **ĉeesti** (ĉe/esti) means to be present at: Mi **ĉeestis** koncerton hieraŭ.
- **partopreni** (parto/preni) means to take part in, to participate in: *Ĉu vi volas **partopreni** nian diskutrondon (or: **partopreni en** nia diskutrondo)?*
- **viziti, vizitadi** means to attend (school, lessons, etc.): *Ŝia filo **vizitadas** bazlernejon.*
- **prizorgi** means to attend to (someone's needs): *Li **prizorgas** sian nepon ĉiusemajne.*
- **atenti** means to attend to (pay attention to): *Infanoj, **atentu** vian instruiston!*



**Lee MILLER**

Liĉjo is a member of the *Akademio de Esperanto*, an expert Esperanto instructor, and he has administered the *Duolingo Esperanto Learners* Facebook group since its inception in 2015.

<licxjo@gmail.com>

# La irlanda semaforo de Sirakuso

vojaĝe tra Usono • Timothy BORONCZYK



En la kvartalo Tipperary Hill de Sirakuso, Novjorkio, staras neordinara semaforo, kiu defias la kutimajn normojn. Pli ol simpla kuriozaĵo, tiuj renversitaj trafiklumoj, kun verda ampolo super la ruĝa, estas simbolo de la irlanda komunumo en la urbo.

Dum la deknaŭa jarcento, Sirakuso grande transformiĝis pro la konstruo de la kanalo Erie kaj rapida kresko de sia salindustrio. La urbo allogis milojn da homoj serĉantaj pli bonan vivon, inkluzive migrintojn el Irlando, kiuj fuĝis pro malsato. La irlandanoj kunportis siajn tradiciojn kaj morojn, kaj profunde influis la karakteron de la urbo. Ili nomis la kvartalon Tipperary Hill, omaĝe al sia hejmo, la graflando Tipperary en Irlando.


En la 1920-aj jaroj la urbestroj instalas modernajn semaforojn en la urbo, inkluzive de unu en la kvartalo ĉe la vojkruciĝo de stratoj Tompkins Street kaj Milton Avenue. Sed tiu semaforo baldaŭ fariĝis neatendita batalekampo de kultura rezisto. La irlandaj junuloj koleriĝis, vidante ke la ruĝa koloro, ofte asociita kun Britujo, staris super la verda, kiu simbolas Irlandon. Ili ĵetis ŝtonojn, kiujn ili nomis “irlandaj konfetoj”, kontraŭ la trafiklumojn kaj rompis ilin.

Ĉiufoje, kiam la urbo riparas la semaforon, la junuloj denove rompis ĝin per siaj “konfetoj”. Post pluraj re-riparoj kaj re-rompoj, la urbestroj fine decidis renversi la ampolojn, por ke la verda estu super la ruĝa. Hodiaŭ, tiu semaforo estas laŭdire la sola de sia speco en la mondo.

La irlanda fiereco daŭre brilas en Sirakuso. En 1997, loĝantoj kaj komercistoj kunlaboris por starigi malgrandan parkon memorigante la eventojn, kun centra statuo nomita *Stone Throwers* (ŝtonĵetantoj). Se vi iam vizitos la lokon, vi nepre rimarkos veran pilkon aŭ ŝtonon, kiun oni metis en la manon de unu el la statuaj figuroj.

La semaforo ricevis internacian rekonon en 2005, kiam la tiama irlanda ĉefministro Bertie AHERN vizitis Sirakuson. Li kaj lia delegitaro fotiĝis antaŭ la semaforo kaj statuo, montrante la fortan ligon inter Irlando kaj ĝia diasporo.

La renversita semaforo fariĝis simbolo de la irlanda komunumo de Sirakuso, kaj estas unu el ĝiaj unikaj kontribuoj al la historio de la urbo. Kiam oni rigardas ĝin, oni vidas ne nur renversitan semaforon, sed ankaŭ la koron kaj animon de komunumo, kiu fieras pri sia kultura identeco.



## Timothy BORONCZYK

programisto.

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas unu el la direktoroj de Esperanto-USA, estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel

<[tboronczyk@gmail.com](mailto:tboronczyk@gmail.com)>



# My take on TAKE

kongresaj raportoj • Jonathan THOMAS



Jonathan (at left) with some friends in Fortaleza.

When I heard about TAKE—the *Tut-Amerika Kongreso de Esperanto*, or the Pan-American Esperanto Congress—I knew I had to go. I had already been to several Esperanto events, such as NASK and the Montreal UK, so a pan-American congress seemed like the next step.

However, it was taking place this year in Fortaleza, Brazil. The price for a flight was high, but I saw that Esperanto-USA was offering stipends and assistance for travel. I was a bit afraid that I might be taking an opportunity away from someone more eager to go, but at the same time, I recognized that many people would be thinking the same thing, which ultimately means nobody else would be asking for financial support. I decided to at least try—I said I would pay for all other costs, as long as I could be reimbursed for the plane ticket. If I was told no, that would be a sign it was not meant to be, and I would just wait until the next TAKE.

Luckily for me, my request was approved. The only condition was that I do something in exchange for Esperanto-USA, but the joke's on them, because this it's something I would have done regardless. Normally I would be planning a trip of this scale for months, but I had only two months to get everything into place, including getting a new US passport. On Halloween, I woke up at 2 a.m. and left my apartment in Utica, New York by 2:30 a.m., headed to New York's JFK airport, where I would soon be departing for Brazil.

Two layovers and a day later, I finally made it to Fortaleza. Fortaleza is in the northeast part of the country, in Ceará state. The city is renowned for its beaches and, given its proximity to the equator, the warm, sunny weather certainly was a welcome relief from the gloomy cold, rainy weather back in New York. As an added bonus, I was able to share an AirBnB with Brandon Sowers and Alex Miller. It was certainly unique sharing an apartment with two of the most prominent American Esperantists in our *movado*.

So what actually happens at a congress? I remember being a beginner and wondering about that but being unable to find solid information. At least with TAKE, there was an official program of lectures, round-table discussions, and presentations of local culture.

I participated in a few of the formal presentations, including a discussion where we went through *La Espero* line by line, such that it made clear sense. While the process was extremely exhaustive, it clarified the meaning for me, because the word order of the poem sometimes obscures the meaning. Likewise, there was a round-table discussion about creating Esperanto events, and bringing up the point of finances, including stipends and financial support. I mentioned that I had received financial support to go to TAKE, and the people leading the discussion pointed out that without participants, there can't be events, and financial support can be a means of promoting events as well.

My favorite part of the program was the cultural presentations. I especially liked the presentation of *maracatu*, a local traditional performance that fuses African and Brazilian cultures dating back to the African slaves brought to Brazil. A band using traditional instruments would play and sing while actors dressed in elaborate garments would dance. I received clarification from a Brazilian I met that the veiled women represent the authority of God, and from what I could gather, the man and woman represent the King and Queen of the slaves. The music sounded like it was from another world to me, and I was severely disappointed they were not selling

CDs.

However, much of what I enjoyed were the informal conversations and cultural exchanges I had. Before my trip, I had read that walking down the street with an alcoholic drink is perfectly legal in Brazil. In the US, this would run afoul of open-container laws that exist in most of the country. I was able to ask: is this really the case? I received confirmation that yes, you can indeed do so, and it was interesting that they wondered why we would bother criminalizing such a thing. I had never really thought about it, and it was interesting to try and explain why we have such laws. Similarly, they had questions about things like US healthcare—it was hard for them to process that healthcare isn't completely free and available in the US. For me, it was just as hard to process the idea of an entire country where you can legally walk down the street drinking a beer.

In a city where most people do not speak English, Esperanto does have its practical benefits. I was in the *Mercado Central*, the main market, buying some souvenirs and gifts for my girlfriend and her family. I had an extremely large bag on my back and was negotiating my way through a crowd of people, hoping to somehow find a spot where I could grab an Uber amid the chaos of traffic around the market. On my way out, I saw two people wearing Esperanto t-shirts and I said “Saluton!” They stopped and were glad to see me. I asked if I could accompany them, hoping to at least talk, as it's not every day I have a chance encounter with other Esperantists. They were planning to leave as well, and were gracious enough to offer me a ride in their car. They were a husband and wife from Brazil who had driven two days to get to Fortaleza, and the wife was a beginner. Aside from the practicality of not having to take an Uber, it was nice to have a pleasant conversation with Brazilian *samideanoj*.

By Saturday, the congress took on a somber tone. Amarilo Hevia de Carvalho, a prominent and somewhat colorful Brazilian Esperantist, had passed away at the age of 91. Remarkably, he was at the congress, very active, selling Esperanto t-shirts *je la prezo de banano* (“for the price of a banana”). The night before he passed, he presented a dramatic sketch where he dreamed he was at the Gates of Heaven and asked St. Peter whether Esperanto is spoken in heaven because it's the only language in which he can truly express himself. St. Peter confirmed that Esperanto is used and loved in Heaven, and Amarilo was joyous to know that he could rest in *verda paco*. Saturday there was an informal service in a local park, which happens to have a bust of Zamenhof, where we paid respects to him. While I am not particularly religious, it was very touching to hear the Lord's Prayer recited in Esperanto. Likewise, Zamenhof's *Preĝo Sub la Verda Standardo* was read, and that is something I will never forget.

This is only a fraction of what I experienced. I got to meet a lot of new people from Brazil, other parts of South America, and even Lithuania. I even had a chance to meet some people I had seen only online at virtual events I regularly attend. All of this was possible largely in part to the generous support of Esperanto-USA—and all because I decided to ask for support.



### Jonathan THOMAS

Jonathan lives in Utica, NY and works as a civil servant. He is an active member of the Syracuse, New York Esperanto Society and a frequent regular of many online Esperanto

gatherings.

<champthom@gmail.com>



# Mikronoveloj

Por nia mikronovelo-rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj – nek pli, nek malpli. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

## Cikloj

Estas denove tiu periodo de la monato, kun ĝiaj malagrablajtoj: malbonhumoro kaj malsatego kaj malfacile klarigeblaj forestoj ĉe la laborejo; la ĉagrena bezono esti preparita; kaj ĉiam, kompreneble, la sango. Vestaĵoj estas purigendaj aŭ eĉ forĵetendaj. Foje ankaŭ aliaj aferoj estas makulitaj per sango: sofo, lito, tapiŝo, aŭtoseĝo – kio iam ne malpuriĝis? – la ĝardenpadŝtonoj ... kaj unufoje la antaŭdoma ŝtuparo de la najbaro. (Purigi tion kaŝe estis malfacile!) Monaton post monato, horloĝregulece, venas la malbeno.



Konfesinde, tamen, akompanas ĝin kompensa ravo.


Ŝi rigardas trafenestre la lunlumigitan gazonon kaj sentas konatan formikadon en la membroj. Tiam, cedante al nerezistebla instinkto, ŝi hurlas.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

## La ŝtelistoj

Plaŭ! Plaŭ! Plaŭ!

Bruo vekas min. Mi rigardas la vekhorloĝon. La 5-an matene!



Kiom da uloj? Ĉu tri? Kvar? Kvin? Ili preterpasas mian domon ĉe la alia flanko de mia dormoĉambro. Eble ili opinias, ke mi profunde dormas je ĉi tiu horo. Mi imagas, kiel ili haltas ĉe la malantaŭa ĝardena barilo. Tio vere ne estas defio. Nur kvar futojn altaj. Facile solvite. Verŝajne almenaŭ kvar trapasas la barilon.

Ho ve! Mi estas sola en la domo. Nur mi povas defii ilin. Mi scias, kion ili celas. Mi havas tiom da

bongustaj trezoroj. Fragoj. Rozoj. Tulipoj.

La cervoj intencas matenmanĝi.


— Ellen EDDY <eddyellen@aol.com>

## La piulo

“Ĉu vi estas Jozefo Lynch?”

“Jes.”

“Mi estas de la Komitato de Ĉielaj Anĝeloj” – li rapide ŝaltas kaj malŝaltas sian aŭreolon kiel pruvo – “kaj mi ĉi-tieas por gratuli vin! Nia informo indikas, ke vi estas la plej pia vivulo nuntempe pro” – li ekrigardas sian iPad-on – “la ofteco de viaj preĝoj.”



Jozefo ridaĉas. “Vi havas la malĝustan ulon, anĝelo.”

“Kontraŭe, la komitato neniam eraras!”

“Dolĉa Jesuo,” Jozefo diras, kaj la iPad-o tintas kiel kaso. “Mi neniam preĝas al via dio” – tinto – “ĉu patro, filo, aŭ io alia!” Tinto.

“Kiel embarase,” la anĝelo diras, rigardante surekrane la kreskantan preĝo-kalkulon. “Ŝajne estas misfunkcio.”

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

## Duelo

Davido, la plej malgranda en la lernejo, ofte fariĝis mokataĵo de siaj samklasanoj. Li humile eltenadis ĉion, ĝis fine lia pacienco estis ĝisfunde elĉerpita. Li eksplodis de kolero kaj elvokis al duelo Johanon, kiu plej laste ĉikanis lin.



Davido kaj Johano ruliĝadis tien kaj reen, firme tenante unu la alian. Geknaboj ariĝis ĉirkaŭen kaj plenvoĉe kuraĝigis unu el ili. Davido baraktis per ĉiu forto, sed baldaŭ konsumis sian tutan energion kontraŭ la pli granda oponento. Li apenaŭ pretigis sin

deklari malvenkon, kiam gorĝoŝira plorkriado surdigis liajn orelojn.

Nekredeble! Ĝi venis el neniu alia ol Johano, kiu kapitulacis sekundeton antaŭ Davido.

— Sung Ho CHO <shhoc7@naver.com>

## La taŭga aŭteto

Li elaŭtiĝas, kaj tuj tieas larĝkravatita vendisto, ridetante apud la kapoto.



“En kian aŭton mi ensidigu vin hodiaŭ?”

“Mi interesigas pri tiu Volkswagen”, li diras, indikante helflavan Skarabon. “Mi bezonas laborveturilon.”

“Ĝi certe faros la veturadon amuza por vi.”

“Por mi kaj dekduo da miaj kolegoj. Ni kunaŭtas.”

“Povus esti malkomforte ...”

“Ĝi taŭgos. Kaj foje ni eĉ veturigas hundetojn.”

“Ĉu ne tro malgranda?”

“Ĝi taŭgos.”

La vendisto ekpensas, ke li traktas kun frenezulo: vendo ŝajnas neverŝajna. “Ni rigardu ĝin”, li diras, senentuziasme.

Ili piediras kune al la Skarabo. Ĉiupaŝe, la grandegaj,

helbuntaj ŝuoj de la kliento laŭte frapas la pavimon.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

## Manĝi sub la steloj

Paro ĉetabliĝas en Esperanto-tema restoracio. Verdaj steloj kaj bildoj de Zamenhof pendas supre.



“Rigardu!” diras la virino, legante menuon. “La pano estas ‘freŝ-BAGH-ita.’”

Ŝia edzo ekrigardas la menuon. “Stulte.”

Alvenas kelnero, kaj la virino mendas: “La ‘ZAM-viĉon,’ bonvolu.” Tiel nomiĝas la hamburgero.

“Por vi, sinjoro?”

“Mi ne diros la stultan nomon. Alportu bifstekon.” Li fingromontras elekton surmenue.

“Bonege! Ĉiuj tion ĝuos,” la kelnero diras, aldonante okulsignon.

“Strange,” la viro grumblas.

Baldaŭ ili ekmanĝas. Sed preskaŭ tuj la kelnero preterrapidas kaj forportas la pladon senvorte.

“Mi ankoraŭ manĝas!” la viro laŭtkrias.

La kelnero retroturniĝas, konfuzita. “Sed vi mendis ‘KABE-bifstekon’, ĉu ne?”

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>


# Ankoraŭ alia terpomo en la bakforno

traduku! • HOSS FIROOZANIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj kaj komentoj.

**E**n tiu ĉi numero ni konsideras fragmenton el *Kindred*, romano de Octavia E. BUTLER unue aperinta en 1979.

En pasintaj numeroj ni renkontis tekstojn plenajn je frapaj idiomaĵoj, foje tre modernaj: vidu ekzemple numerojn 2021:1 (“*I didn’t want to blow my downloads*”) kaj 2021:5 (“*We told them to kiss their ass goodbye*”).



La romano *Kindred* de Octavia E. BUTLER unue aperis en 1979. En 2022, la firmao FX adaptis ĝin al televidserio.

Kompare al tiuj, la parolturnoj en *Kindred* ŝajnas pli kutimaj kaj memkompreneblaj – kaj sekve pli facile tradukeblaj. Sed por la tradukanto, ŝajne memkompreneblaj idiomaĵoj estas kaptiloj tre insidaj ...

Finfine kvar bravaj legantoj (BM, BS, DH, kaj SD) afable sendis siajn zorge faritajn tradukojn. Mi kore dankas kaj gratulas!

## Rimarkindaj vortoj kaj frazoj

- ***I was working out of a casual labor agency***

La laborservo ne rekte dungas laborantojn; ĝi nur aranĝas portempajn kontraktojn inter laborontoj kaj dungontoj. Tial la rakontisto diras *working out of* kaj ne *working for*.

Niaj tradukintoj provis esprimi la rilaton inter servo kaj laboranto simile nerekte. La plej trafaj, laŭ mi, eksplicis tiun peradon, ekzemple: *mi laboris pere de* (BM).

- ***a casual labor agency***

Ĉiuj elektis formon de *agentejo*, vorto sufiĉe vasta por priskribi diversspecajn oficejojn kie laboras agentoj – inkluzive ĉi tian. Sed eble ni ne devas paŭsi la originalan *agency* tiel sklave. Almenaŭ ĉi-fraze, la ideo estas efektive *servo*, ĉu ne?

La vorto *casual* kutime signifas “neformala”, “hazarda”, “facilanima”, aŭ simile. Sed ĉi-fraze Butler uzas ĝin en pli faka senco: “neregula” aŭ “provizora”. Niaj tradukintoj redonis interalie *portempa*, *laŭpeta*, kaj *intermita*. Mi iom hezitas pri la lastaj du. Laboro *intermita* supozeble ĉesas kaj poste rekomenciĝas, sed *casual* ne nepre promesas rekomenciĝon. La vorto *laŭpeta* sugestas portempecon, foje – sed ĉu nepre? Ĉu ne ĉia pagata laboro (ĉu portempa, ĉu longdaŭra) estas *laŭpeta*?

Aliaj ebloj: *neregula*, *nedaŭra*.

- ***we regulars called it a slave market***

Oni proponis: *spertuloj*, *kutimuloj*, kaj *ĉiutaguloj*. Pri la lasta mi hezitas nur pro tio, ke oni povus eble misinterpreti ĝin: *ĉiutagulo* povas esti ne nur iu, kiu aperas preskaŭ ĉiutage (ja la senco de la originalo), sed ankaŭ iu banala aŭ ordinara. Aliaj ebloj: *konstantaj/oftaj klientoj*.

- ***slave market***

Kelkaj redonis *sklavbazono*; aliaj, *sklavmerkato*. Kvankam pravigebla, *merkato* estas ankaŭ parte falsa amiko de la anglalingva *market*, vorto kiu povas nomi ne nur abstraktan sistemon de komerco (*merkato*) sed ankaŭ konkretan komercejon (*bazono*). Tiu ĉi *market* ŝajne priskribas ion konkretan, do mi inkliniĝas al *bazono*.

- ***they couldn’t have cared less***

Jen tre ofta idiomaĵo en la angla, foje aperanta en la samsenca sed nelogika formo *could have*

*cared less*. Du tradukintoj provis fidele konservi ĝin per *ne povus ĝeniĝi malpli*, kaj *ne povis fajfi plu*, sed mi iom dubas pri la internacia komprenebleco de tradukoj tiel laŭvortaj. Pli plaĉas al mi la aliroj laŭsignifaj: *[ili] neniom zorgis pri* (SD), kaj *ne gravis al [ili]* (DH) – tamen al tiu lasta mi antaŭmetus tute.

Interese, en sia **kolekto de tradukitaj**

**frazoj** <<https://katalogo.uea.org>

/[katalogo.php?inf=824](https://katalogo.php?inf=824)>, Felix WOOLF

proponis zamenhofan proverbon: *Ĝi tuŝas [ilin], kiel akvo anseron*.

- **more job hunters than jobs**

Kelkaj proponis *serĉantoj*, ĉu memstaran (BM), aŭ en kunmetaĵoj: *laborserĉantoj* (BS) kaj *ofico-serĉantoj* (DH). SD proponis *laborkandidatoj*. Alia eblo: *aspirantoj*.

- **If you wanted them to think about using you, you went to their office**

La sirena kanto de la anglalingva *you* forte delogis niajn bravajn heroojn al la danĝeraj *vi*-rifoĵoj. La pronomo *vi* tamen ne nomas nedifinitajn personojn, kiel *you* faras en la angla; en Esperanto, nedifinita persono estas *oni*.

Eble ni povus pravigi *vi* se ni imagus, ke la rakontisto parolas rekte al la leganto pri tiu mem: “Se *vi*, kara leganto, estus unu el tiuj laborserĉantoj, kaj *vi* volus, ke la estroj konsideru vin ...”. Sed tia pravigo ŝajnas iom harfenda. Do pli plaĉas al mi la solvo de DH: *Por esti konsiderata kiel dungoto, oni devis iri al la oficejo ...*

- **winos trying to work themselves into a few more bottles**

Por *winos* oni redonis *vinmaniuloj*, *vindrinkemuloj*, kaj *drinkemuloj*. El tiuj, la lasta ŝajnas al mi la plej ofte uzata. Iomete pli simpla solvo estas la zamenhofa *drinkulo* (“tiu, kiu kutime drinkas”). *Drinkulo* drinkas ne nur vinon, kompreneble – sed laŭ iuj difinoj, ankaŭ *wino* drinkas ne nur vinon, sed

diversajn alkoholaĵojn.

Pli interesaj estis la redonoj de la bele konciza esprimo *work themselves into a few more bottles*. Kelkaj tradukintoj parafrasis tion, ekzemple per: *esperis labore akiri kelkajn pliajn botelojn*; kaj *penantaj mongajni por aĉeti pliajn botelojn*. BM proponis la koncizan *provante perlabori plurajn botelojn pli*.

- **poor women trying to supplement their welfare checks**

Du proponis esprimojn kun *helpĉeko* (*socia kaj registara*), kaj unu redonis *bonfartaj pagoj*.

Mi ne scias, ĉu ekzistas konata termino por *welfare check* en Esperanto. Tamen mi iom preferas la solvon *socia asignaĵo* (SD), ĉar la ĉefa signifo de *asigni* estas “disponigi (rimedojn) por aparta celo”. Komparu la similan terminon **socia asekuro**

<[https://vortaro.net/#sociala\\_kd](https://vortaro.net/#sociala_kd)>, kiu aperas en PIV.

- **older people who'd lost one job too many**

Temas pri homoj *senlaboraj*, sed la rakontisto enmetas *job* por eĥi la antaŭan frazon (*kids trying to get a first job*) kaj esprimi simplan ideon per malsimpla, subkomprenata historio: jam antaŭ longe ili dungigis la unuan fojon (kontraste al la junuloj), poste maldungigis kaj redungigis plurfoje, sed finfine la maldungoj estis unu pli ol la dungoj ... do ili nun serĉas laboron denove.

Niaj tradukintoj provis kelkmaniere konservi la ludon, ekzemple: *jam perdis unu postenon tro*; *jam maldungigis tro da fojoj*, ks. Brave, sed eble tia fideleco ne necesas, kaj eĉ riskas konfuzi la leganton. Eble sufiĉas la pli simpla *jam maldungita*. Tio konservas la kernan ideon sed ankoraŭ eĥas la verbon de la antaŭa frazo.

- **a poor crazy old street lady who talked to herself constantly**

Ĉu *poor* ĉi-fraze signifas *malriĉa*, aŭ ĉu

*kompatinda*? Ambaŭ sencoj ŝajnas taŭgaj, sed mi supozas, ke la rakontisto kompatas la virinon pro ŝia frenezo. Unu tradukinto elektis *kompatinda*, alia *malriĉa*, kaj du ruze elektis *povra*, vorton konvene kunplektantan ambaŭ sencojn de *poor*.

En la angla oni emas kunmeti longajn ĉenojn da adjektivoj antaŭ substantivoj, kiel ekzemple en *poor crazy old street lady*. Ofte tiaj ĉenoj ne tro pezas, ĉar multaj el la eroj estas nur unusilabaj. Sed la fraza pezo rapide kreskas en plursilaba Esperanto. Komparu: *povra freneza maljuna senhejma virino*. Kelkaj tradukintoj provis koncizigi per afiksoj kaj interpunkcia grupigo: *povra senhejmulino, freneza kaj maljuna* (DH); aliaj turnis sin al neologismoj kaj forĵetis detalojn jam implicitajn, ekzemple: *povra senhejma oldulino* (BM).

- **You sat *until the dispatcher sent you out on a job or sent you home***

Jen alia paralelismo, ĉi-foje kun ripetita *sent*. Eblas same ripeti la Esperantan verbon *sendi*, sed *dispatcher* (*sendisto*) povas komplikigi la aferon per eĉ pli da ripetigo: *sendisto sendis ... sendis*.

Du tradukintoj solvis la problemon per la preskaŭ-sinonimoj *peristo* kaj *ekspedisto*. Unu pasivigis la esprimon, forlasante la aganton entute: *ĝis kiam sendita [al laboro]*. Tia frazkonstruo estas konata en la angla (*you sat there until sent off on a job ...*) sed ĝi aspektas iom strange al mi en Esperanto. Alia tradukinto konservis la sendiston, sed evitis la verban ripetigon: *ĝis la sendisto sendis [onin] aŭ al posteno aŭ hejmen*.

- **Home meant no money. *Put another potato in the oven*.**

Kelkaj tradukis pli-malpli rekte: *metu alian/plian terpomon en la (bak)foron*. Tute en ordo, sed ĉu la esprimo povus profiti per iom da klarigo? Plaĉas al mi, ke DH emfazis la magrecon de la manĝaĵo per aldono de la partikulo *nur*: *denove enformigi nur terpomon*.

- ***the minimum wage***

Du redonis *minimuma salajro*, unu *salajriĝi minime*, kaj unu *minimuma pago*.

La vorto *pago* estas kompreneble tute en ordo ĉi tie, tamen ĝi maltrafas la ideon de periodeco. Finfine, *wage* estas ne nur unusola pago, sed sumo periode pagata.

Anglalingvanoj foje hezitas traduki ĝin per *salajro*, eble pro tio, ke *wage* kutime nomas pagon tagan, semajnan, aŭ monatan, sed *salary* ofte nomas pagon jaran. Kontraste, la Esperanta *salajro* ne portas implicon pri periodo. Por specifi periodon, oni aldonas adjektivon: *semajna salajro, jara salajro*, ks.

- ***minus Uncle Sam's share***

Kompreneble temas pri impostoj, do la laŭsignifa *minus imposto* (DH) estas tute en ordo, kaj eble preferinda elekto por internacia legantaro. La tri aliaj tradukintoj elektis konservi la tradician personigon de Usono, per ekzemple *minus la parto por Onklo Sam* kaj simile. Tia solvo ja gustas pli usonece, kaj eble la nomo *Onklo Sam* estas ja tiel bone konata internacie, ke ĝi ne kaŭzos konfuzon.

- ***you stuffed envelopes***

Interalie oni redonis: *ŝovis aĵojn en kovertojn; plenigis kovertojn; kaj plenumigis kovertojn*. Indas noti, ke *plenumi* estas ofta kaptilo; ĝi ne signifas “fari ion plena”, sed “plene fari ion” aŭ “efektivigi la sekvojn de io” – simile al *fulfill* en la angla. Do oni plenumas taskon, devon, ordonon, kaj simile – sed metante leteron en koverton, oni ne plenumas la koverton; oni plenigas ĝin.

- ***you sorted potato chips (really!)***

BM proponis la verbon *sortimenti*, kiu signifas “liveri taŭge elektitan kolekton inter si diferencaj”. Tio eble taŭgas se *sorted* ĉi-fraze signifas “presented an assortment of”. Tamen la posta (*really!*) sugestas al mi, ke temas pri ago ne nur teda, sed efektive tre nekutima. Do supozeble oni ne liveras kolektojn da ĉipsoj inter si diferencaj, sed ordigas la ĉipsojn laŭ

grandeco, forigas ĉipsojn difektitajn, aŭ simile. Tial mi preferas la simplan kaj same ambiguan *oni ordigis ĉipsojn*, kiel proponis kelkaj aliaj el niaj tradukintoj.

Evidentiĝis ankaŭ iom da necerteco rilate la ĝustan nomon en Esperanto por *potato chips*. Unu proponis *terpomflokaj*, solvon tute bonan (kaj **ankaŭ bonlingvan**

<[http://bonalingvo.net/index.php/Ssv:\\_%C4%88](http://bonalingvo.net/index.php/Ssv:_%C4%88)>). Alia elektis *terpom-fritoj*, kiu efektive nomas *french fries*. Kaj du redonis *ĉipsoj*, kiu laŭ PIV nomas la ĝustan manĝaĵon: “terpomaj lamenoj, frititaj kaj krustecaj.”

- ***you marked prices on merchandise***

Alvenis kvar similaj solvoj: *markis prezojn*; *metis prezojn*; *afiŝis prezetikedojn*; kaj *prezo-markis*. Ĉiu kaptas la ĝustan ideon, sed kio pri la pli konciza, tamen ne same preciza *etiketi* – aŭ ĝia pli ofta (sed strange, ne PIV-a) sinonimo, *etikedi*?

- ***mindless work [...] done by mindless people***

Jen ankoraŭ alia retorika ripetiĝo, sed la signifoj de la du adjektivoj ne estas tute samaj: *mindless work* estas laboro tiel simpla kaj rutina, ke ĝi ne stimulas la menson; sed la homoj en *mindless people* ne estas nepre rutinaj aŭ simplaj. Ili estas *mindless* ĉar ili agas senpense, zombie, aŭ robote, kvazaŭ mensoj mankas al ili. De la vidpunkto de la dunginto ili estas ne homoj sed nur iloj, kies mensoj ne meritas konsideron.

Du tradukintoj redonis ambaŭ signifojn per la adjektivo *senmensa*, kiu ja estas rekta traduko de *mindless* – sed ĝi estas malofte uzata en Esperanto, kaj mi ne certas, ĉu ĝi klare portas ambaŭ priajn signifojn de la anglalingva vorto.

Por priskribi *mindless work* oni pli kutime uzas *banala*, *teda*, ks.; tion faris BM per *gurda laboro*. Por *mindless people* la pli kutimaj adjektivoj ŝajne estas *sencerba* kaj *sen(pri)pensa*. Uzante du malsamajn adjektivojn, tamen, oni perdas la ripetiĝon de la originalo. Ĉu gravas? Eble ne, sed DH

sukcesis konservi tiun ripetiĝon per uzo de klarigo anstataŭ adjektivo: *laboro [kiu] ne postulis pensadon ... farita de senpensuloj*.

## La sinteza traduko

Jen la kutima provo konstrui solvon uzante la diversajn proponojn de niaj tradukintoj (kun ankaŭ kelkaj arbitraj aldonoj). Kiel ĉiam, ne temas pri definitiva solvo – ĉar tiaj solvoj ne ekzistas en tradukado! – sed pri elektoj laŭ propra gusto.

Por tiuj, kiuj volas vidi ĉiujn proponojn kaj kompari ilin detale, en la reta versio de la artikolo vi trovos paralelan prezenton de ĉio.

Mi trovis laboron tiutempe per servo por dungatoj portempaj – ni oftaj klientoj nomis ĝin sklavbazararo. Efektive, temas pri la tuta malo de sklaveco. Tute ne gravis al la estroj, ĉu oni aperis por fari la proponitan laboron, ĉar ĉiam estis pli da kandidatoj ol postenoj. Por ricevi eĉ konsideron, oni devis alveni ĉe la oficejo ĉirkaŭ la sesa, enskribiĝi, sidiĝi, kaj atendi. Kune atendis ankaŭ drinkuloj, esperante perlabori kelkajn botelojn pli, malriĉulinoj kun siaj infanoj, provante suplementi la socialan asignaĵon, junuloj, volante dungigi la unuan fojon, pli aĝaj homoj jam maldungitaj, kaj kutime iu povra, senhejma oldulino senĉese parolanta al si mem – kiu neniam dungigis, ĉar ŝi portis nur unu ŝuon.

Tie oni sidadis ĝis oficisto sendis onin al laboro aŭ al la hejmo. Hejmeniro signifis neniun enspezon. Denove oni metis nur terpomon en la bakfornon. Aŭ senespere vendis sangon ĉe unu el la klinikoj apud la laborservo. Nur unu fojon mi faris tion.

Laboro signifis laŭleĝe minimuman salajron – minus la impostoj por Onklo Sam’ – por tiom da horoj, kiom la dunginto bezonis. Oni balais plankojn, plenigis kovertojn, inventaris, lavis telerojn, ordigis ĉipsojn (vere!), purigis necesejojn, etikedis varojn ... oni plenumis la komision, kio ajn ĝi estis. Preskaŭ ĉiam temas pri gurda laboro farita – laŭ la vidpunkto de la dunginto – de sencerbuloj, ne-homoj luitaj por kelkaj horoj, tagoj, aŭ semajnoj.

---

La rubriko *traduku!* nun paŭzas ĝis venontjare. Dankon al ĉiuj partoprenintoj pro iliaj spritaj kontribuoj en 2023!

---